

"NAĈERTANIE" DE GARAŠANIN - IDEOLOGIA BAZO DE ŜOVINISMA PROGRAMO

MARENGLLEN VERLI (AL)

Ekde la Mezepoko, sed precipe ekde la pasinta jarcento, estas Serboj inspiritaj de arta kaj literatura verkaro, kiu prezentis la realon akcentante centralismon en ĝia politika filosofio. Lau tiu koncepto Beogrado devus konsekvence kontroli faton de ĉiu ajn ŝtato au nacio, kiu estus ligita, ligata kaj ligota kun Serboj. Kroatoj kontraue montris ĉefe politikan federalismon.

Surbaze de ĉi tiuj konceptoj oni devis fondi unuiĝintan jugoslavan ŝtaton konforme al regionaj au distriktaj naciaj cirkonstancoj. En ĉi tiu ŝtato la konsistigaj partoj devus havi politikan egalecon kaj autonomion. Ĉe la "sudslavoj", aparte ĉe iliaj elitoj sociekonomiaj kaj politikaj, esperantaj pri komuna ŝtato, kontraustaris du principoj. En unu el ili, ĝuste en la serba varianto, oni trovas ankau vidpunkton de Garaŝanin.

Necesas akcenti, ke la fama "naĉertanie" de Garaŝanin, komence, estis sekreta privata idearo, kiu nur poste formiĝis kiel fundamenta programo por organizado de la serba ŝtato.

(Rimarko de la redaktanto: la rusa vorto *naĉertanie* povas signifi malneta skribajo, skizo, *koncepto*, kompendio).

En 1844, kiam Ilia Garaŝanin, prezentis tiun koncepton al princo Aleksandr Karaĝorĝeviĉ, li estis ministro de Internaj Aferoj en Serbio. Ŝajne, oni eĉ ne povus paroli pri ia ŝtata dokumento en plena senco de la vorto. Ankau post ĝia leĝiĝo, *naĉertanie* restis daure io kaŝa. Oni eksciis, ke la unua fremda registaro koninta ĝin, tiu de Vieno, havigis al si ekzempleron almenau post 1883, dum la vasta publika opinio eksciis pri ĝia ekzisto nur je la jaro 1906, kiam *naĉertanie* estis publikigita en la revuo "Dello" de Beogrado.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Ekde la publikigo *naĉertanie* fariĝis inter historiistoj akre kaj severe pridiskutenda kaj pridebatenda objekto. Serboj estas traktintaj ĝin kiel unu el la projektoj pri jugoslava ŝtato, dum por historiistoj kroataj, slovenaj, albanaj kaj aliaj *naĉertanie* konsistigas ŝovinisman programon celante inkluzivi en unueceman "Grandan Serbion" ĉiujn teritoriojn de la sudaj slavoj kaj vastajn landojn de aliaj najbaraj nacioj.

Kian Koncepton Ilia Garaŝanin vere ofertis, kvazau alternative, estas klarigebla per trarigardo pli malpli detale de lia programo, komencante de origino.

Post malsukceso de liberiga pola revolucio en 1830, la eksministro pri Eksteraj Aferoj de Rusio en la jaroj 1801 - 1806, de pola deveno, Adam Czartoryski kaj liaj kunlaborantoj, orientis klopodojn por estigi koalicion de la sklavigitaj slavaj nacioj, kontraustarantaj al Rusio kaj al la okupanta Austrio. Reprezentantoj de la pola nacia movado esperis helpo flanko de la slavaj popoloj en la suda Balkano por venki rusojn kaj austrojn kaj restarigi sendependan unuiĝintan Pollandon. Por tiu celo A. Czartoryski kompilis en 1834 programon, lau kiu oni devus evoluigi internan kaj eksteran politikojn de Serbio, la sola slava ŝtato en la Balkano de ia graveco, kiu estante sendependa kontribuus al organizado de kunagado de la sudaj slavoj. Czartoryski pridiskutis sian planon kun František Zach, de ĉeĥa deveno, kiu estis sendita kiel pola reprezentanto. Dum la jaro 1843 F. Zach ofte renkontis I. Garaŝanin kaj ili supozeble konversaciis pri la rolo ludenda de Serbio en Balkano kaj pli vaste.

Lau propono de serba ministro, au je propra iniciato, Zach kompilis en la unua duono de 1844 planon, kiun li prezentis al Garaŝanin. Surbaze de tiu teksto, skribita de ĉeĥo, tiu pretigis *naĉertanie*.

Preskau 90 % de *naĉertanie* estas kopiita lauvorte de la plano de Zach. Sed kelkaj partoj de ĉi tiu plano, au unu triono de lia 30-paĝa teksto, estas flankenlasita de Garaŝanin.

En la idearo de Garaŝanin oni traktas tri ĉefajn temojn: politika celo de Serbio, politiko sekvenda rilate koncerne Rusion kaj Austrion kaj konduto de Serbio rilate al la slavoj sur la Balkano.

La aŭtoro ekde komenco akcentis, ke jam estas la momento por difini la celon de Serbio por la estonteco kaj por komenci ĝian realigon.

Kiel ĉefan celon li konsideris plenumigon de la tasko, difinita de caro Stefan Dušan, interrompita de Batalo de Kosovo en 1389. Tiel rekreiĝo de Serba Imperio justigiĝis kiel historia rajto, kaj la regantoj de Serbio de la XIX-a jarcento devus plenumi tiun taskon ne faritan de antaŭuloj. Lau Garaŝanin tio estu "sankta historia rajto" kaj "ne iu kaŝema detrua revolucia ago".

En *naĉertanie* same aperis la ideo, ke sukceso de misio de Serboj ne dependus nur de klopodoj de Serbio, sed ankaŭ de sinteno de Rusio kaj Austrio kaj precipe de iliaj kontraŭstaro al la Osmana Imperio.

Plue en *naĉertanie* oni akceptis ideon, ke sukceso de politiko de Serbio dependas de fakto, kiom aliaj slavoj de la balkano aliĝus al tiu politiko; tial oni rekomendis ke, antaŭ ol komenci aplikon de la programo, Beogrado devus havigi al si politikan kaj informan materialon pri najbaraj popoloj.

Tiucele Garaŝanin programis vojaĝigon de fidindaj homoj en Bosnio-Hercegovinon, en Montenegron, en Nordan Albanion, Dalmacion, Kroation, Slovenion, Baĉkon kaj Banaton, kiuj sin okupu pri kompilo de raportoj sekretaj pri tiuj landoj, en kiuj oni priskribus politikajn interrilatojn kaj grupiĝojn, evidentigus amikojn kaj malamikojn de Serbio, eĉ ankaŭ politikajn celojn de apartaj popoloj kaj laueble la rolon, kiun ili en iliaj propraj programoj agnoskis por Serbio.

La de Beogrado senditoj devis ankaŭ kolekti informojn pri la milita potencialo de tiuj popoloj, pri strategiaj lokoj, kvanto kaj kvalito de armiloj ktp.

Oni aprecis kiel aparte grava la instruadon de agentoj. Oni skribis en *naĉertanie*, ke Serbio nur post kompletigo de ĉiufankaj informoj pri najbaroj povus marŝi certe sur la vojo de realigo de sia nacia plano.

Lau la opinio de Garaŝanin, Bulgaroj - kvankam launombre la plej granda popolo inter la sklavigitaj sudaj slavoj - precipe pro longdaŭra turka jugo ŝanĝiĝis en popolon obeeman kaj malmemkredantan. Plue, lau li, ebla ekesto de ia danĝera kontrauserba bastiono en Bulgario malproksimigus la eblecon de serbo-bulgara kunlaboro, same de serbo-rusa, malgrau ekzisto de sama kontrauosmana orientiĝo. Por malgrandigi kiom eble ĉi tiun danĝeron, oni faris en *naĉertanie* multajn proponojn,

kiuj certigus simpatian al Serbio flanke de la bulgara popolo; sed oni ne transiras ĝis la ideo de kunvivo de ambau nacioj en unu ŝtato taksante tion danĝera al serba hegemonio.

En ĉirkaŭ du kvinono de *naĉertanie*, kaj tio estas ĝia ĉefa parto, projektiĝis la politiko de Serbio al Bosnio-Hercegovino, Montenegro kaj Norda Albanio. Lau opinio de Garaŝanin tiuj landoj estas "sub plej granda influo de Serbio", kiu agus tie pli sukcese. Koncerne tiujn regionojn oni pripensis ekonomiajn, politikajn kaj edukoreligiajn rimedojn, kiuj devus pretigi terenon por starigi la serban regadon.

Plue *naĉertanie* pritraktis rimedojn por ebligi detruigon de komerca monopolo de Austrio en Serbio; ĉi-kadre, eliro al Adriatiko, en albana marbordo de Ulqin, estis konsiderata necese, kio ebligus rektajn komercajn rilatojn kun europaj landoj kaj asimilon al fruktdonaj komercaj metodoj de la slavoj en Dalmacio. La komerca agento en Ulqin, kiu prizorgus tiun ekonomian agadon, samtempe atingus politikan influon sur Montenegro kaj Norda Albanio. Ankaŭ ne restis ekster atento de Serbio la landoj de Savo kaj Danubo, kie vivis serboj, nome Sremo, Baĉko kaj Banato.

Laste parolas Garaŝanin en tiu unua, detaligita ideara programo de Serbio pri neceso de kreskigo de reciproka fidindeco inter serboj, ĉeĥoj kaj slovakoj.

Tiuj estis esencaj vidpunktoj de *naĉertanie*; sed - kiel ni jam menciis antaŭe - ĝia reala senco evidentiĝas nur, se oni atenteme pristudas, kion Garaŝanin ŝanĝis en la originala plano de Zach. En ties preparita materialo okulfrapas la vaste uzata termino "slavo de sudo". Garaŝanin tiun anstatauis regule per la termino "serba". Dum en la enkonduko de Zach oni difinas, ke Serbio povas pligrandiĝi kaj akiri sian celon nur kune kun "sudaj slavoj", estas skribita de Garaŝanin kun "popoloj ĉirkauantaj". Zach plie esprimas, ke la fundamenta principo de politiko de Serbio devus esti "sudslava", dum Garaŝanin definis, ke Serbio "devus klopodi aligi al si ĉiujn najbarojn de la serba popolo". La tiel nomitan "sudslavan" politikon de Serbio difinitan de Zach eliminis Garaŝanin tute. Zach konsideris Austrion kiel "malamikon de sudslava ŝtato", dum por Garaŝanin Austrio estas "malamiko de la serba popolo".

Lau Zach Serbio devus esti la kerno de "estonta sudslava imperio", sed laŭ Garaŝanin la kerno de "estonta serba imperio". Sufiĉas ĉi tiuj komparoj por kompreni, ke Garaŝanin pensis kiel serba ŝovinisto kaj ne kiel sudslava liberecemulo.

Alia granda manko en *naĉertanie* estas necesa pritrakto de la kroata problemo. Garaŝanin menciis nur en kelkaj kazoj la vorton Kroatio, precipe rilate al la kreskigo de la serba influo tie. Koncerne la kroatajn katolikajn religiulojn en Bosnio oni parolis simple pri "bosnaj katolikoj", kiujn oni devus liberigi de austra influo kaj kiuj devus inklini "pli multe al Serbio" same kiel tuta Bosnio.

Aparte grava estas la forpreno de la parto pri "Interrilatoj de Serbio kun Kroatio" el la origina plano de Zach.

La tria grava ŝanĝo, farita de Garaŝanin en la plano de Zach, konsistas el la forigo de alia parto, dediĉita al la interna politiko de Serbio. En ĝi eksplikis Zach, ke la ekstera politiko de Serbio ne sukcesus sen tauga reguligo de siaj internaj aferoj; laŭ li, Serbio devus disvastigi inter siaj ŝtatoj animon de kunlaboro ĝis al unuiĝo sen antaŭjuĝoj kun la kroatoj.

La komparo de la plano de Zach kun tiu de Garaŝanin montras, ke Garaŝanin reduktis ĝin kaj ŝanĝis multon en la teksto, kompilita de Zach, konforme al malvastaj ŝovinismaj interesoj de Serbio. La nova celpunkto estis ekstarigo de perspektivo pri serba hegemonio sur la aliaj sudaj slavoj kaj sur aliaj najbaraj popoloj kiel albanoj, hungaroj, rumanoj k.a., kies teritorioj estus okupiteblaj kaj anekseblaj. Tio evidentiĝas, se oni observas aldonajojn, kiujn Garaŝanin faris al la plano de Zach.

Unua aldono koncernas la serbo-rusajn rilatojn. Dum Zach ne havis esperon al kunlaboro kun Rusio pritraktinte la polan vidpunkton, Garaŝanin tiun eblecon ne tute ekskludis; laŭ li, Rusio kaj Serbio havis premisojn en pluraj direktoj, ankau sur historia bazo, por esti alianculoj. Komparante la originan dokumenton de Zach kaj tiun de Garaŝanin oni povas distingi tuj notindajn diferencojn inter jugoslavismo de la unua kaj serbismo de la dua. Zach prezentis la bazajn principojn de jugoslava programo, laŭ kiu la unuiĝo kaj kultura bonkompreniĝo kondukus al politika malkverelo. Li montris ankau la anticipe ĉefajn rimedojn, kiujn

Serbio devus entrepreni por akiri tiun celon. Sed politikistoj kaj serba intelektularo emis nur al serba ŝovinisma ideo kaj ne povis aliĝi al ideo de jugoslavismo. Tiu ideo portis malklarajn kaj fremdajn idealojn por ili.

Sendepende de faktoj, kiuj ne kondukas al ajna dubo, la serba nuntempa historiografio daŭras akcenti, ke *naĉertanie* estis plano por jugoslava unuiĝo surbaze de nacia egaleco kaj ne surbaze de unuecema serba regado. Malgrau tio, justigoj de serbaj historiistoj ne kapablas kaŝi la veran karakteron, profunde ŝovinisman de grandserbema ideo, kompilita de Garaŝanin. En la hodiaŭa historiografio dominas la opinio, ke Garaŝanin celadis unuiĝi ĉiujn sudajn slavojn en unuecan ŝaton sub direkto de Serbio - celo, kiu gvidas ankoraŭ nuntempe la politikon de Serbio.

Adreso de la aŭtoro: Marenglen Verli
Albana Akademio de Scienco
Tirana
ALBANIO

La redakcio ricevis tiun kontribuon pere de S-roj Vasil Pistoli, prezidanto kaj B. Mezini, estrarano de la Albana Esperanto Ligo, poŝtrestante, Tirana, Albanio.

(Ĉar temas pri historia aspekto kun aktualaj konsekvencoj la redakcio staras la artikolon al diskuto, kio signifas, ke la redakcio pretas publikigi rilatajn komentojn au kontraŭajn studojn, kiuj prilumas tiun historian teson aliaspekte).